NIA PONTO

Grupo Esperantista
Barrencalle Barrena, 7- 1ª dekstre
E-48005-BILBAO (Hispanio)
Redaktas: Jesús-Miguel García Iturrioz

Kunven-tago: Vendredo
☎: 94.416.44.92
☎(portebla):696.613.958
💻: tepgaitj@lg.ehu.es

Jar-kotizoj: Normala: 2.800 ptoj/16,83 €. Speciala: 2.200 ptoj/13,22 €.
Familia: 5.000 ptoj./30 €. BBK-konto: 22-1800155-0

JANUARO/FEBRUARO 2001

TRE GRAVA ALVOKO.

Karaj geesperantistoj de la Grupo de Bilbao, jam pasis 2 jaroj de kiam ni nomumis la nunan estraron de nia rondo; tial, alvenis tempo por renovigi ĝin; se, jam tradicie, ĉiam estas gravaj problemoj por trovi homojn pretaj donaci etan pecon de sia libertempo por labori cele al daŭrigado de la esperanta agado en Bilbao, nun tiuj problemoj vere realas: la homoj, kiuj dum multaj jaroj prenis sur sin la respondecon pri la diversaj farendaj taskoj (cirkulero, korespondado, librotenado, kursoj, ...) anoncis ke, eĉ pro demokratia bezono, ne plu plenigos tiajn taskojn.

Sekve de tio, devas aperi kvinopa skipo, kiu anstataŭu la nunan estraron; se ne estus tiel, neniu okupiĝos pri la farendaĵoj kaj la Grupo marŝos sola kien neniu scias. Ĉi-foje, la helpalvoko estas tre serioza, do ne malatentu pri ĝi.

ĈIUJARA ĜENERALA KUNVENO.

Laŭ postulas la statutoj de nia asocio, ni kunvokas ĉiujn ĝiajn anojn partopreni la ordinaran ĝeneralan kunvenon, kiu okazos la **vendredon 2an de marto, je la 19,30 h.**, laŭ la ĉi suba tagordo:

1. Aprobo, se indus, de la protocolo pri la antaŭa ĝenerala kunveno.
2. Aprobo, se indus de la spezokontoj de la jaro 2000.
3. Aprobo, se indus, de la buĝetpropono por la jaro 2001.
4. Informoj far de la estraro.
5. Adaptigo de la jarkotizoj 2002 al eŭro.
6. Nomumo de nova estraro.
7. Demandoj kaj sugestoj.

RECUERDA: El viernes 2 de marzo, Asamblea General, a las 19,30 h.

NEKROLOGO.

La pasintan 9an de decembro forpasis en Bilbao nia asociano **José Antonio Oyarzábal Tejado**, malnova esperantisto, tre aktiva siatempe. Ke li pace ripozu.

NIA SOCIARO.

Dum la jaro 2000, al nia E-grupo:

Aniĝis: Jolanta Poprawska

Eksis:	Raúl Alonso Fernández	(03-03-2000)	Adreso nekonata
	Ander Aguilar San Millán	(22-09-2000)	Ne pagis kotizojn
	Andrés Aguirre Urrutia	(22-09-2000)	Ne pagis kotizojn
	Esteban Esteban Peñalba	(22-09-2000)	Ne pagis kotizojn
	Andrés Roales Lobato	(22-09-2000)	Ne pagis kotizojn
	José A. Oyarzabal Tejado	(09-12-2000)	Mortis
	Julián Anguita Pareja	(22-12-2000)	Adreso nekonata.

Tiel, la 31an de decembro, nia E-Grupo nombris 76 anojn.

ZAMENHOFA FESTO-TAGO.

Kiel anoncite, la 16an de decembro ni celebris la zamenhofan naskiĝdatrevenon ĉe nia grupejo, kun la ĉeesto de 20 geesperantistoj. Post spektado de videofilmo enhavanta intervjuon, farita de la televidĉeno "Bilbovisión" al niaj samideanoj Eduardo Larrouy kaj Jesús M. García, okazis vigla diskuto pri la presentado de Esperanto ĉe la amaskomunikiloj.

Bondeziraj vortoj de nia prezidantino, Igone Manciles, malfermis la vojon al alia pli vigla interparolado ĉirkaŭ tablo plenplena de la manĝaĵoj kaj trinkaĵoj alportitaj de la ĉeestantoj.

KRISTNASKA LOTERIO.

Malgraŭ ke en la listoj disvenditaj de diversaj ĵurnaloj la saman tagon, kiam okazis la lotado, nia numero aperis kiel premiita, verŝajne estis eraro, tiel ke en la oficiala listo ĝi ne estis. Pro tio ke tiu ĉi lasta estas la sola kiu validas, kun bedaŭro ni konstatis ke, denove, **ni ne trafis premion**.

Koran dankon al ĉiuj, kiuj helpis nin per aĉetado kaj disvendado de la kvitancoj kaj ... ĝis la venonta jaro.

COBRO DE CUOTAS 2001.

Según se decidió en la Junta General del 03-03-2000, las cuotas de socio para el presente año 2001 pasan a ser las siguientes:

Cuota normal: **2.800 pts.** (16,83 euros).
Cuota reducida (jubilados, estudiantes, parados, ...): **2.200 pts.** (13,22 euros)
Cuota familiar (común para todos los residentes en un mismo domicilio): **5.000 pts.** (30 euros).

No necesitamos recordar que el pronto pago de las cuotas redunda en un mejor funcionamiento del Grupo. A aquéllos que la tienen domiciliada a través de la BBK, se les pasará al cobro en los próximos días. **A quienes aun no la tienen domiciliada, les rogamos que nos den un número de cuenta en la BBK para facilitar los cobros**. Muchas gracias por vuestra colaboración.

PREZENTADO DE LIBRO.

La eŭska traduko de la libro "El la vivo de bervala sentaŭgulo" ("Bervalen gertatuak"), originale verkita en Esperanto far de Louis Beaucaire, estis prezentita, en la urbo Vitorio-Gasteizo, la 17an de januaro. Dum la prezentado prelegis Aitor Arana, kiu estas la tradukisto, kaj Xabier Rico, esperantisto el Vitorio.

(Informis: Xabier Rico)

INTERVJUO EN "RADIO ECONOMÍA".

La mardon 23an de januaro, nia samideano Jesús M. García estis intervjuata, telefone, de Begoña Jiménez, simpatia ĵurnalistino el "Radio Economía"; spite de ĝia nomo, tiu radistacio, kies sidejo troviĝas en Mungia, urbeto proksima al Bilbao, okupiĝas ne nur pri ekonomio, sed pri kia ajn afero; dum preskaŭ duonhoro, Jesús havis la okazon paroli pri la historio de Esperanto, ĝia esenco, la kursoj en la E-Grupo kaj en la Universitato, la movado en Bilbao, la avantaĝoj scii Esperanton (vojaĝoj, Pasporta Servo, komunik-ebloj per Interreto, ...), la estonteco de nia lingvo, ...

Ĉe la fino kaj jam for de mikrofonoj, la ĵurnalistino varme, kore kaj sincere invitis telefoni ŝin ĉiam, kiam ni havos la bezonon propagandi niajn agadojn, ĉar ŝi pretas fari novan intervjuon.

INTERVJUO EN RADIO EUSKADI.

La sabaton 16an de decembro 2000 je la 17:20, je senpera elsendo, nia madrida samideano Marcos Cruz estis intervjuata de Jon Urresti en la programo "La montaña mágica", de radio Euskadi.

La ĵurnalisto antaŭtelefonis por informi pri la demandoj kaj temoj starigotaj. La 20-minuta intervjuo okazis tre glate, kaj li havis favoran sintenon al la afero. Demandoj temis ĉefe pri: rilato inter Esperanto kaj Interreto; la akcepto de Esperanto en la tri ĉefaj komputilaj mastrumsistemoj (DOS/Windows, MacOS kaj Linux); Virtuala Esperanto-Biblioteko kaj aliaj rimedoj en la reto; utiligo de Esperanto; Pasporta Servo; antaŭjuĝoj pri Esperanto; rolo de la angla kompare al Esperanto; protekto de minoritataj lingvoj; kaj aliaj temoj.

(Informis: Marcos Cruz)

HISPANA E-KONGRESO.

La 60a Hispana Esperanto-Kongreso okazos en San Javier (Murcia), de la 22a ĝis la 30a de junio 2001.

Kongresejo: Centro Cívico de San Javier. Parque Almansa.

Kongreskotizoj en pesetoj: ĝis la 30a de Aprilo: 5.000

Poste: 5.500.

INTERNACIA JUNULARA CONGRESO.

Vi eble jam scias ke la Internacia Junulara Kongreso (IJK) 2001, organizata de TEJO kaj JEFO, okazos en Strasburgo (Francio) de la 29a de julio ĝis la 5a de aŭgusto 2001. Per tiu mesaĝo mi oficiale kore invitas vin partopreni !

Pli da informoj kaj la aliĝiloj troveblas ĉe la TTT-ejo http://purl.org/net/ijk2001 aŭ ĉe la JEFO sidejo.
Skribu al jefo@esperanto.org aŭ al Violette Walther, LKK prezidantino.
Vi ankaŭ povas kontakti nian dissendliston : ijk-organizado@club.voila.fr

(El Interreto)